

Johann Gottfried Hientzsch,

## Kanto de ligo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Fratoj, manon donu kore  
 Kaj senzorge, sendolore  
 Belan horon festu ni!  
 Ĉion teran forĵetante,  
 Daŭru forte kaj konstante,  
 Nia bela harmoni'!

Al la Dio kantu gloron:  
 La spiriton kaj la koron  
 Kial donis la ĉiel' ?  
 Serĉi lumon por vereco,  
 Serĉi virton per justeco  
 Estu nia sankta cel'!

Homoj en la oriento,  
 Homoj en la okcidento.  
 En la sud' kaj en la nord'!  
 Alte teni homan nomon,  
 Kore ami ĉiun homon  
 Estu nia liga vort'.

*Traduko de la Germana poemo "Bundeslied" de JOHANN GOTTFRIED HIENTZSCH (\*1787 – †1856) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-279-569 (2014-02-15 13:23:44)*

*Tiun ĉi tradukon mi prenis el la interretejo "http://www.cezarkulturo.de/154385.html" de Hans-Georg Kaiser (Cezar). Ĝi troviĝas ankaŭ en la kolekto "www.literaturo.dk" sub http://literaturo.dk/novaj.htm.*